

La Bulteneto

Numero 81 - Esperantojaro 140



Nummer 81 - Jahr 2026

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN



**Du frenezaj turoj
kaj aliaj kuriozaj aferoj en Vieno**

La Bulteneto

Numero 81  Esperanto-jaro 140

Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko > La Bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:

Viena ESperanto-Aktiveco VESPA

Tekstoj: Renate kaj Walter Klag

esperanto@chello.at

Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono

Sur la titolpaĝo

La Frenezula Turo „Narrenturm“ en Vieno

Fotoj Klag kaj Vikipedio

La Frenezula Turo

Narrenturm

La turo staras en la areo de la iama Ĝenerala Hospitalo kaj konstruiĝis 1784 fare de Josef Gerl dum la regado de la germana imperiestro Jozefo la dua. Ĝi estas kvinetaĝa cirkla konstruaĵo kun 28 ĉambroj en unu etaĝo, mallarĝaj fenestroj kaj centra diametra alo orientita nord-sude. Entute estis 139 individuaj ĉambretoj por la mensmalsanaj pacientoj. Ĉiu ĉambreto estas ĉirkaŭ 13 kvadratajn metrojn granda kaj povas esti enirita el la cirkla koridoro. La gardistoj loĝis en la meza alo. La germana imperiestro Jozefo la dua studis similajn instituciojn dum sia vojaĝo en Francio. Konsiderante la historian kaj socian kuntekston la konstruado de la Frenezula Turo reprezentas progreson. La ĉambretoj por la „frenezuloj“ estis ekipitaj per necesejo kaj la centra hejtadsistemo. Kvar fornoj en la kelo de la konstruaĵo provizis la ĉambretojn per varma aero. Kiam ili estis konstruitaj, la ĉambretoj ne havis pordojn kaj la konstruaĵo ne estis ligita al la kanalreto.

La patologia muzeo fondiĝis en 1796 dum la regado de la germana imperiestro Francisko la dua kiel muzeo de la Patologia-Anatomia Instituto. La kolekto estas en Narrenturm ekde 1971. La tiama Ĝenerala Hospitalo transformiĝis 1988 ĝis 1998 al loko por universitataj institutoj, nomita Campus (kampuso).

Ekde 1869 Narrenturm ne plu uziĝas por pacientoj.

Ligiloj:

de.wikipedia.org/wiki/Narrenturm

de.wikipedia.org/wiki/Altes_Allgemeines_Krankenhaus_Wien



La iama Ĝenerala Hospitalo,
nun loko por universitataj institutoj.



En la unua korto de la iama Ĝenerala Hospitalo.


1886 L. L. Zamenhof vojaĝis al Vieno por studi oftalmologion en speciala kurso en la Ĝenerala Hospitalo. En aŭtuno 1886 li revenis al la gepatra hejmo en Varsovio. Tie li laboris kiel okulkuracisto.



La monumento montras la germanan imperiestron Jozefo la dua en la dua korto de la iama Ĝenerala Hospitalo.



La suda fasado de la iama Ĝenerala Hospitalo.




Antaŭe la suda fasado de la tiam nova Ĝenerala Hospitalo.

1784.

Malantaŭe la Frenezula Turo.

El Vikipedio.



La Générale Hospitalo 1830.

El Vikipedio.

La Turo de Kornhojzel

Der Kornhäuselturm



Kornhojzel-turo en Vieno 🌸 Kornhäusel-Turm in Wien

Kornhojzel-Turo konstruiĝis inter 1825 kaj 1827 fare de la arkitekto Joseph Kornhäusel [jozef kornhojzel] en la unua distrikto de Vieno. En tiu tempo ĝi estis la plej alta laikeca turo en Vieno. La alteco estas 35 metroj. Ĝi havas naŭ etaĝojn.

La turo funkciis kiel la loĝejo kaj studio de Kornhäusel. La verkisto Adalbert Stifter vivis ĉi tie en la 1840-aj jaroj. Stifter observis la totalan suneklipson je la 8a de julio 1842 sur la observo-platformo de la turo.

La simpla fasado kun siaj malmultaj fenestroj bezonas nun renovigon. La suda flanko de la turo, situanta sur la strato Fleischmarkt [flajŝmarkt]¹, estas ĉirkaŭita de restaĵoj de iamaj domoj.

Maliculoj asertas, ke Kornhäusel havis tre babileman edzinon. Tial li retiriĝis ofte en la plej supran etaĝon kaj fermis la pordon. Sed oni ne kredu ĉion.

de.wikipedia.org/wiki/Kornh%C3%A4uselturm

https://de.wikipedia.org/wiki/Joseph_Kornh%C3%A4usel

¹ lama vendejo por viando.



La tabule ludanta bovino

Vieno, unua distrikto, Bäckerstraße 12

“Kie la bovino ludas sur la tabulo”,
ankaŭ

"Kie la lupo ludas kun la bovino ĉe tabulo [triktrako]".

Fine de la 14-a jarcento la domon posedis la posta urbestro Konrad Vorlauf, sekvita en la 15a jarcento fare de membroj de aliaj konataj burĝaj familioj.

La fasada fresko, kiu aperas sur la doma muro kaj estas klarigita per surskribo, kreĝis en la 17a jarcento.

Ĝi estas eble satiro pri protestantismo. En la dua duono de la 18a jarcento parto de la domo venis en la posedon de Charlotte Countess Nimptsch (sola posedanto en 1769) kaj posediĝis de ŝiaj heredantoj ĝis la 20-a jarcento (Nimptschpalais).

Dum renovigo de la domo en la jaro 1980 la fresko, kiu estis kaŝita malantaŭ puco, iĝis videbla denove.

Wo die Kuh am Brett spielt

Wien 1., Bäckerstraße 12.

Auch "Wo der Wolf mit der Kuh am Brett [Backgammon] spielt".

Ende des 14. Jahrhunderts besaß das damalige Haus der spätere Bürgermeister Konrad Vorlauf, im 15. Jahrhundert folgten Angehörige anderer namhafter Bürgergeschlechter.


Um die Mitte des 17. Jahrhunderts dürfte jenes Fassadenfresko entstanden sein, das bis Ende des 18. Jahrhunderts an der Hauswand zu sehen war und durch eine Aufschrift erläutert wurde. Es dürfte sich, im Gegensatz zu Deutungen aus dem 19. Jahrhundert, um eine Satire auf den Protestantismus handeln. In der zweiten Hälfte des 18. Jahrhunderts kam ein Teil des Hauses an Charlotte Gräfin Nimptsch (1769 Alleinbesitzerin) und blieb bis ins 20. Jahrhundert in der Hand

ihrer Erben (Nimptschpalais). Im Zuge einer Hausrenovierung wurde um 1980 das durch neueren Putz verdeckt gewesene Fresko wieder sichtbar; es wurde restauriert.

https://www.sagen.at/texte/sagen/oesterreich/wien/1_bezirk/kuh_am_brett.html

La Ŝvebanta Baleno

Baleno estas mamulo. Tamen Vienanoj diras „Walfisch“ [valfiŝ], do „balen-fiŝo“. Prater estas la amuzkvartalo de Vieno. Tie staris la restoracio „Zum Walfisch“ „Al la Balen-Fiŝo“.



Vieno, Prater: La iama restoracio „Al la Balen-Fiŝo“.

Maldekstre tobogano.

Wien, Prater: Das ehemalige Restaurant „Zum Walfisch“.


Links Toboggan.



La baleno sur la restoracia tegmento.



Dekstre Maria Benke, la arkitektino de la baleno, kun kolego.
Foto el la 1950aj jaroj. Kopirajto familio Böhm.



La interna skeleto de la baleno estis tiam el ligno, la haŭto el kupro. La maso estis 1400 kg, la longeco 9,5 metroj kaj la alteco 3 metroj.

Nun, post la renovigado, la maso de la baleno estas 1700 kg.

Necesis aldoni interna strukturo por stabiligi la objekton.

Ekde la jaro 1951 la akvoŝprucanta baleno tronis sur la tegmento de la restoracio, kiu malkonstruiĝis 2011. La konstruisto Güner Ayaz [giner ajaz] ne ruinigis la beston, sed konservis ĝin sur deponejo.



La baleno sur la deponejo.
[Der Wal auf der Deponie.](#)



Transportado de la baleno al Vieno-Muzeo.
Transport des Wals zum Wien-Museum.





Okaze de la rekonstruado de Vieno-Muzeo:
Regula Künzli kun modelo de la ŝvebanta baleno.

Filmo:

<https://www.youtube.com/watch?v=zVhxpnsyaZU>

La baleno alvenas al Vieno-Muzeo kaj estas transportata al la planita pozicio en la centra halo kun ege granda peno kaj singardemo kaj uzado de diversaj transportiloj kaj leviloj.

La „Prater-Baleno” estas la unua objekto en la nova Vieno-Muzeo. Pli ol sesdek jarojn ĝi tronis sur la tegmento de la restoracio “Al la Balen-Fiŝo”. Danke al privata sava operacio la legenda maskoto eniris la kolekton de la Vieno-Muzeo. En la deponejo de la muzeo la baleno restaŭriĝis, la fera kadro kaj la ligna konstruaĵo ene de la baleno estis plifortigita por la nova prezentado en la centra halo de Vieno-Muzeo. Danke al sia kompleksa statiko la baleno ŝvebas nun en la halo supre de la vizitantoj. En la filmo centraj aktoroj de la aŭdaca, sukcesa entrepreno rakontas pri statikaj kalkuloj, nova skeleto por la besto kaj ĝia „piĵamo” por la tempo ĝis la malfermo de la muzeo.

Unue la Baleno estis sennoma. Tial la urbo Vieno alvokis al voĉdono pri la nomo por la baleno per Instagramo. Disponeblaj por elekti estis la nomoj Ottilie, Poldi, Walli, Valerie kaj Walburga.

Post trisemajna voĉdona tempo la rezulto estis klara je la 5a de januaro 2023. La baleno nun nomiĝas „Poldi”, karesa formo de „Leopoldo”.

Pli ol 60 jarojn la baleno tronis kiel maskoto sur la tegmento super la enirejo de la gastejo. Ĝi ŝprucigis akvofontanon, brilis nokte kaj entuziasmigis junulojn kaj maljunulojn, longtempe ankrita en la kolektiva memoro de la viena loĝantaro.


Kiam la gastejo estis malkonstruita de la konstrua kaj malkonstrua firmao AYKA en la jaro 2013, la posedanto de tiu firmao, Güner Ayaz, savis la balenon kaj organizis transportadon al la tereno de sia firmao nur malmultajn kilometrojn sude de Vieno. Tie la baleno restis en stokeja halo. Konkretan planon, kio devus okazi al la metala-ligna „Balen-Fiŝo”, Güner Ayaz ne havis.



Foto privata: Güner Ayaz savis la Balenon

En la jaro 2016 li ricevis telefon Alvokon el la buroo de la viena kultura konsilanto. Güner Ayaz decidis donaci la balenon, se ĝi venus al muzeo por ĝojigi multe da homoj.

Kiam la proksimume 10 metrojn longa, 3,5 metrojn alta kaj 1400 kilogramojn peza objekto estis alportita al Vieno Muzeo (vidu bildojn), ĝi estis tre veterdamaĝita. Restaŭristo Regula Künzli kaj ŝia teamo sukcesis renovigi la balenon tiel, ke la malnova patino ne perdiĝis.



Aktuale la baleno ŝvebas en la centra halego de la renovigita muzeo.
Derzeit schwebt der Wal in der zentralen Halle
des renovierten Museums.

La Eŭropa Arbocirklo en Vieno

kun eksmembro

La verdaj areoj ĉirkaŭ kaj antaŭ la Votopreĝejo (Votivkirche) en la 9a distrikto de Vieno dizajniĝis en la 1870aj jaroj post la konstruado de la preĝejo. Grava alikonstruado okazis en 1961, kiam konstruiĝis subtera parkejo kaj la trairejo Schottentor (Skota Pordego).

La 25-an de marto 1997 Eŭropa Unio plantis 15 arbojn por la EU-membroŝtatoj, markante la 40an datrevenon de sia fondiĝo. Okaze de la pligrandigo de EU en majo 2004 oni starigis granitan tablon kaj 10 sidlokojn por la 10 novaj EU-anoj meze de la arba rondo. La tablo reprezentas vivan dialogon kaj invitas restadi. En 2022 la arbocirklo plivastiĝis per 3 arboj por Bulgario, Kroatio kaj Rumanio.

La sekvaj arboj reprezentas la membrojn de EU.

Aŭstrio: Etfolia tilio (*Tilia cordata*)

Belgio: Tremolo (*Populus tremula*)

Bulgario: Plataneca acero (*Acer platanoides* "Eurostar")

Danio: Ruĝa kverko (*Quercus rubra*)

Finnlando: Penda betulo (*Betula pendula*)

Francio: Pseŭda akacio (*Robinia pseudoacacia*)

Germanio: Tigfrukta kverko (*Quercus robur*)

Grekio: Pomarbo japana abunde floranta (*Malus floribunda*)

Hispanio: Reĝa juglando (*Juglans regia*)

Irlando: Ordinara frakseno (*Fraxinus excelsior*)

Italio: Flora frakseno (*Fraxinus ornus*)

Kroatio: Eŭropa fago (*Fagus sylvatica*)

Luksemburgio: Tigfolia kverko (*Quercus petrea*)

Nederlando: Betulo (*Betula pendula*)

Portugalia: Korkokverko (*Quercus suber*)

Rumanio: Ulmo rezista (*Ulmus* "New Horizon" ® Resista)

Svedio: Sorbo (*Sorbus intermedia*)

*Unuiĝinta Reĝlando: Eŭropa fago (*Fagus sylvatica*)*

Post briteliro en 2020 la arbo restis.

La verdaj areoj ĉirkaŭ Votokirko (Votivkirche) nomiĝas "Votivpark". La verdaj areoj ĉirkaŭ la cirklo estis nomitaj por la honoro de profesoro Sigmund Freud [frojd] (1856 ĝis 1939), la fondinto de psikoanalizo.

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Votivkirche_\(Vieno\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Votivkirche_(Vieno))



Sed amikeco estas ĉi tie por resti – post briteliro
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Briteliro>

Sigmund Freud-Park und Votivpark

Lage: Wien 9., Sigmund Freud-Park und Votivpark

Die Grünflächen um und vor der Votivkirche im 9. Bezirk wurden in den 1870er Jahren im Anschluss an den Kirchenbau gestaltet. Der nächste größere Umbau erfolgte 1961 mit der Errichtung einer Tiefgarage und der Schottentor-Passage.

Am 25. März 1997 pflanzte die Europäische Union 15 Bäume für die EU-Mitglieder und beging damit den 40. Jahrestag ihrer Gründung. Anlässlich der EU-Erweiterung im Mai 2004 wurden in der Mitte des Baumkreises ein Granit-Tisch und 10 Sitzgelegenheiten für die 10 neuen EU-Mitglieder errichtet. Der Tisch steht für gelebten Dialog und lädt zum Verweilen ein. 2022 wurde der Baumkreis mit 3 Bäumen für die Länder Bulgarien, Kroatien und Rumänien erweitert.

Die folgende Bäume stehen für die Mitglieder der EU.

- Belgien: Zitterpappel (*Populus tremula*)
- Bulgarien: Spitzahorn (*Acer platanoides* "Eurostar")
- Dänemark: Roteiche (*Quercus rubra*)
- Deutschland: Stieleiche (*Quercus robur*)
- Finnland: Birke (*Betula pendula*)
- Frankreich: Scheinakazie (*Robinia pseudoacacia*)
- Griechenland: Zierapfel (*Malus floribunda*)
- Irland: Gemeine Esche (*Fraxinus excelsior*)
- Italien: Blumen-Esche (*Fraxinus ornus*)
- Kroatien: Rotbuche (*Fagus sylvatica*)
- Luxemburg: Traubeneiche (*Quercus petraea*)
- Niederlande: Birke (*Betula pendula*)
- Österreich: Winterlinde (*Tilia cordata*)
- Portugal: Korkeiche (*Quercus suber*)
- Rumänien: Resistente Ulme (*Ulmus* "New Horizon" Resista)
- Schweden: Schwedische Mehlbeere (*Sorbus intermedia*)


Spanien: Nussbaum (*Juglans regia*)

Vereinigtes Königreich: Rotbuche (Fagus sylvatica)

Trotz des Brexits 2020 bleibt der Baum erhalten.

Die Grünflächen um die Votivkirche wurden 1984 nach dieser Kirche als "Votivpark" benannt. Die Grünflächen zum Ring hin sind nach Professor Sigmund Freud (1856 bis 1939), dem Begründer der Psychoanalyse, benannt.

[https://de.wikipedia.org/wiki/Votivkirche_\(Wien\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Votivkirche_(Wien))



Votokirko – Votivkirche



Anoncoj



Floro de frago fotita de Irene Klag

Nova monero 5000 Steloj el pura plateno

La Aŭstria Monerfarejo AG pregis 2025 platenan moneron
kun nominala valoro de 5000 Steloj.

Eldonkvanto: Nur 25 ekzempleroj.

Aĉetebraj ankoraŭ 11 ekzempleroj.

Materialo pura plateno 999,5/1000.

Diametro 30 mm $\pm$ 0,1 mm.

Maso 15,56 g $\pm$ 0,1 g ($\frac{1}{2}$ unco).



Prezo: 1200 €

Pregita en ringo, ripa rando, stampita, surfaco spegulanta brilo
(prooflike).

Averso:

5000 STELOJ 2025 — ESPERANTO — UNU UNCO
DA PURA PLATENO 999,5 – Steloj.

Platenstampo laŭ aŭstria leĝo Pt 950.

Reverso:

Motivo prenita el 50 Steloj "JULIA ISBRÜCKER ESPERANTO 1887-1971"

Informoj kaj mendoj: Walter Klag, Vieno, esperanto@chello.at

Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko”, probable la ununura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.

La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian **terminaron**.

2014 - 2025 ENA varbis mondvaste 172 individuajn membrojn kaj 25 asociajn membrojn.

Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas **SENPAGE** aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi”).

Krome la **NUR PERRETA** revuo estas tute **SENKOSTA**! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron!

Vi decidus poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de
„Esperanta Numismatiko”





Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9

Haltestelle Herrengasse der U3

☎ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h

Donnerstag 10 bis 21 h

Esperantokurse und Führungen auf Anfrage

Im selben Haus befindet sich auch die

Musikaliensammlung und das
Globenmuseum